NI PRENIS LA "LIBERECON"

La Kongresanoj estas tiaj fervoraj liberecamantoj ke nenio malhelpus ke ili faru viziton al la Sinjorino mem. Ŝi staras sole sur insulo en la haveno de Nov-Jorko kaj oni devas uzi vaporboaton por tien iri. Sed, ho ve, atinginte la pramon ni devis resti iom da tempo ĝis la minacanta pluvego sufiĉe malsekigis la benkojn de la boato. Tamen, oni trovis ke kelkaj Nov-Jorkaj tagjurnaloj estas sufiĉe sekaj (ŝerco!) por ŝirmi nin kontraŭ la malsekeco de la sidlokoj. ("Ĝia sola bona utilo?" demandis Bostona membro.) Alveninte al la statukronita insulo, kiam la vetero rebeliĝis, ni rimarkis la antaŭe nesus-

pektitan grandecon de la monumento. Ni eniris malgrandan pordon en la bazo de la pedestalo. Ho ĉielo, la Sinjorino Libereco estas malplena! "Similas al mi antaŭ mia tagmanĝo,"— rimarkis S-ro S.

Nu, Libereco estas tia alta idealo ke oni devas malrapide kaj laciĝe grimpi por atingi la supron,—aŭ uzi la lifton. Ankaŭ la spirito de Libereco ne toleras kaĝojn, sed per unu el ili oni supreniras al ŝia kapo. Spite la timojn de F-ino B. kaj la pezeco de S-ro M. la ŝnuro ne disrompiĝis, kaj ni atingis la plej altan "etaĝon" sendifekte. Ni nun rimarkis ke Ŝia Moŝtino havas truojn en sia frunto tra kiuj oni povas ĉirkaŭrigardi, vidante la mirindan havenon kaj la grandan urbon apudan. Sed S-ro Maŭry ne estis kontenta **trarigardi** la truojn,—li elmetis siajn krurojn! Turistoj ĉe la bazo suprenrigardantaj miris kiajn strangajn, aktivajn okulbrovojn Libereco havas!

Ĝi ne estus Esperanta okazo se ne aŭdiĝus niaj kantoj, kaj ne forgesu ke S-roj Klajin kaj Bowyer kun la "Harmonia Floro" nepre ĉeestis. Do, "Ekskurskanto," "La Gaja Studento" kaj kompreneble, "La Espero" sonadis tra la kavajoj kaj eksteren de la balkanioj de la pedestalo. Kvankam niaj gekunuloj aŭskultis de malsupren granddistance ili klare aŭdis ĉion.

Vere, dum ni estis sur la insulo ni ja "posedis" la statuon. "Ni prenis la Liberecon,"—kiel diris S-ro H. Kaj tiunokte en mia "ronkejo" mi songis ke mi forkuras de Bedloe's Insulo kaj Nov-Jorko kun la Statuo de Libereco sub la brako!

Fratamurbano.

THE BANQUET

On Friday evening we enjoyed our thirteenth annual banquet. Tables were set in one of the smaller of the numerous banquet-rooms of the Hotel Bristol. The menu was carefully considered and was a real treat for the hungry workers who had been obliged to sit through a long business session and various committee meetings. Each course bore an Esperanto phrase alluding to its character, each was clearly and appropriately worded by Mr. Morton.

Among the guests was the well known American poet Mr. Edward Markham, widely known as the author of the poem, "The Man with the Hoe." Mr. Markham read some selections of his own, and afterwards paid a beautiful tribute to Dr. Zamenhof and to the language Esperanto and its object.

Mr. H. W. Fisher acted as toast master, and though he claimed it to be his "first offence," his introductions, all given in Esperanto, were charming in their aptness and simplicity.

President Payson being called upon read a poem written in Esperanto by Mr. H. I. Keyes relating to "Babilo" an imaginary city which had cursed the world by its confusion of languages, and its being totally destroyed by the universal language Esperanto.

Messrs. Hetzel, Bardorf, Lee and Morton were especially happy in the delivery of their extemporaneous speeches. Misses Stoepler, Martha Root, Cora Butler and many others, among them being Josefo Silbernik gave additional pleasure by their well chosen remarks.

Afterwards other speakers were called upon. To name them would be to give a list of every well known Esperantist who was present, and who all responded, each proving his or her ability to speak Esperanto fluently.

In every way the thirteenth annual banquet was thoroughly enjoyable, and another instance of the feeling of oneness among Esperantists.

LA EKSKURSO AL LA "PALISADES"

La ĉefa, kaj eble la plej ĝuita, el la ekskursoj dum la Kongreso estis la vizito al "Interstate Park," kiu okazis Sabaton posttagmeze la 24an Julio. Tiu ĉi parko kuŝas en la ŝtatoj New Jersey kaj New York—multajn kilometrojn laŭ la bordo de la granda, kaj tre plena de historia intereso, rivero, "Hudson," kaj enhavas la mondfamajn Palisarojn (Palisades), kiuj konsistas el ŝtontavoloj sin jetante vertikale kaj laŭlonge ducent metrojn en la aeron. S-ro Fisher portis kun si en sia aŭtomobilo ges-rojn Payson kaj F-ino Meriam. La ceteraj iris laŭ la subvoja vagonaro (tubo) de "Times Square" ĝis "Dykeman Strato," kaj multaj estis la imagoj, sed neokazantaj malfacilaĵoj kaj malfeliĉaĵoj de la oficiala gvidisto. Sed li similigis—ne kara leganto, li tute ne similigis—tiel S-ro Fisher bonvole proponis ke li portu en sia aŭtomobilo tiujn kiuj ne povas facile marŝi, sed la plejmulto piede supreniris. Eble ĉar li invitis la "gemaljunulojn" !!!

La vidaĵo de la supraĵo, kiu tiuloke suprenrigardas la urbon New York, estas grandioza. La granda Hudson kovrata per boatoj kaj velkanotoj, kaj kun larĝeco de du kilometroj estas belega. Oni restis ĉe la rando de la Palisades, kaj sin amuzis diversmaniere, kiel povas nur eskursante geesperantistoj, kaj poste manĝis bonajn sandviĉojn, kiujn mendis por ni F-ino Stoeppler, la bona feino, sekretarino de nia kongreskomitato. Post la manĝo oni devis rapidi ĉar jam malfruiĝis kaj nun preparis pluvegi.

Nia lerta (?) gvidisto sukcesis surpramigi ĉiun krom si mem, sen kiu la pramo foriris kaj li devis atendi la sekvontan. Dume ekpluvegis !

En la vagonaroj kaj sur la pramoj oni multe parolis Esperanton kaj kantis multajn Esperantajn kantojn, kaj tiamaniere bone propagandis. Fakte, unu el la karakterizaĵoj de la kunvenoj kaj ekskursoj de la Nov-Jorkaj Esperantistoj estas la kantado. Kaj tre efika propagando kaj sinkuraĝiga estas la ofta kantado de niaj kantoj.

Inter la kantoj S-ro Chaumette, nia Esperantista "Charlie Chaplin," amuzis nin per ridindaj imitadoj de la originala S-ro Chaplin.

Unu policano ĉe la parko, kiu intencis malpermesi nin porti la "Irlandan Standardon" kiel li pensis, forte interesiĝis pri nia kara lingvo post kiam kelkaj ĉarmaj Esperantistinoj klarigis la aferon al li kaj sciigis lin ke en Eŭropo multaj "aliaj lertaj" policanoj jam fariĝis spertaj Esperantistoj ! Tre sukcesa estis la ekskurso, belaj la kantoj, kaj bona ĉio, sed super ĉio estis la sociala interrilatado inter niaj rondanoj.

Lewis H. Maury.

THE CONCERT

The week was closed by a concert on Saturday evening in the Genealogical Hall by the Harmonio Chorus, all its members being Esperantists. The Society was assisted by Mrs. Minnie Heidecke Kerr, who sang several solos in a thoroughly artistic style. Mrs. Kerr is the possessor of a remarkably strong soprano voice of rarely beautiful quality. She is temperamental and convincing and added greatly to the enjoyment of our evening of music.

Mr. Richard Carter recited "Al La Fratoj" by Dr. Zamenhof. All who have conversed with Mr. Carter well know how fluently he speaks Esperanto, in fact he refuses to speak in any other language. It is therefore useless to praise his rendering of his selection. It was admirably well done.

The Harmonio Chorus is a volunteer choir of young Esperantists trained by Mr. Willis Bowyer. The Choir gave numerous well selected numbers, all being encored. It was a musical treat to hear the young voices, fresh, musical and true as they sang the selections with real understanding and musical effect. All enjoyed Mr. Bowyer's singing of the English song "Esperanto."

Just before the final quartette of songs to be sung by the Harmonio Chorus Mrs. Catherine M. Healey and Mr. James F. Morton gave in Esperanto, translated by Mr. Morton, a scene from "The Count of Monte Christo." This was a surprise and greatly added to the pleasure of the evening. With the singing of the last group of four songs, "Pacatalanto," "La Tagiĝo," "La Festotago" and "La Gaja Studento," our thirteenth annual convention came to its close, and the Harmonio Chorus and its fellow artists deserve, and have received, the thanks and praise of all who were present.

EN LA HARMONIA KREMGACIAJEJO

Kvankam la Esperantistaj lernejoj kaj horoj pro la granda varmegeco en la lumvoja urbego ĉesis kunveni meze de junio, la direktoraro de la Harmonio, decidis ke pro la nacia kongreso, oni kunvenigu la kantistaron por tiamaniere montri al la kongrespartoprenontoj la veran spiriton de la Harmonianaro. Decidite,—farite!

Ĉiun sabaton vespere je la 7a, kolektiĝis la paca laborantaro en la Bahaa Librejo, kie okazis unue la kunveno de la kongrespreparanta komitato, kaj poste la teatrado kaj kantado. Estis ĉiam je la 11a horo kaj eĉ post tio, kiam oni kune forlasis la librejon. Pro la varmegeco oni serĉis ion refreŝigan, kaj nia samideano James Morton, aŭ kiel lin S-ino Stoner nomas Ĝim, gvidis nin preskaŭ unu dozenon da stratblokoj ĝis la kremglaciejo, kiun li rekomendis al ni, kiel unu el tiaj, kiaj havas la koron vendi al ni, kremglaciaĵon, inda laŭnome kaj laŭkoste! F-ino Butler, F-ino Stoepler kaj S-ino Sorensen, certigis ke S-ro Morton decidis bone, kaj ni tuj sentis, ke ni ne promenis vane al tiu ĉi loko. En ĝi ni kantis kaj serĉis ĝis la postmeznokta horo, sed la plej grava afero estis, ke Harmonio establis regularon, ke neniu en tiu ĉi loko estas permesata uzi alian ol nian Esperantan lingvon, escepte kun la gekelneroĵ, dum tiaj amikoj niaj, kiuj

ĝis nun ne sukcesis paroli Esperante, estas permesataj paroli angle, sed ni devas respondi Esperante al ili, tiamaniere facile kaj malrapide, ke ili komprenu ! Por ĉiu vorto neesperanta oni devis pagi punmonon de unu nikelo kaj por unu sentenco unu dajmon ! La mono estos uzota por bela standardo de la Harmonio. Oni vere sekvis la regularon kaj parolis Esperante !

Dum la kongresa semajno sed alvenis ankaŭ tiuj Harmonianoj kiuj ne ĉeestis niajn kunvenojn kaj kelkaj gastinoj el aliaj urboj, kaj al tiuj ni diris pri nia regularo kaj ĝia sukceso de paroligo de nia kara lingvo.

La Harmonio kolektis dum tiuj tagoj \$4.25 kiel punmonon, kaj mire, nur de veraj Esperantistoj, nenion de novuloj !

Inter pli ol unu dozeno da gesamideanoj troviĝis nur F-ino Segal el Brooklino, kiu neniam vizitis Esperantan lernejon, sed lernis nur legi kaj kantis kun ni. Ŝi estis la sola permesata paroli angle, sed al ŝi oni ankaŭ devis respondadi Esperante !

La unua kiu malobeis nian regulon estis samideano Stankunas. Li venas el Litovanio, preskaŭ ne parolas angle, kaj nur ĉiam, se kun ni, Esperante ! Diris li al Izidoro Bortnik: "Det ajskrim iz verri gudd.

Ha, ha, ha, ĉiuj ridegis kaj S-ro Morton, al li: Dek cendojn, dek cendojn, S-ro Stankunas ! Kiu kolektos ilin? Kaj mi respondis: F-ino Lincoln, nia sekretariino.

Sed la kompatemulo respondis: Mi hav gat no ten sents.

Ha, ha, ha, Aliajn dek cendojn! Estas dudek nun! Li devas pagi, kaj se li ne havas, li povas pruntepreni!

Kaj lia rea certigo estis nun: Mi not vont tu lend!

Tridek cendojn, nun, kriis ĉiuj!

Li bonkore respondas: Mi ne havas eĉ unu dajmon in maj packets!

Kvardek cendojn nun! La lastaj vortoj estis sentenco tute angle !!!

Diris al li Izidoro Bortnik: Pay it now!

Dek cendoj sinjoro Izidoro, kriis lia frato Morris Bortnik, nia fama artisto, kiu pentris la portreton de nia majstro!

But I wanted to help Mr. Stankunas!

Aliajn dek cendojn, S-ro Izidoro, alvenis voko el ĉiuj gorgoj!

Sinjoro Stankunas respondis al Izidoro: Mi no nijd jur help!

Izidoro: But I wanted to save you from paying more!

Stankunas kvindek, Izidoro tridek! kriis la tuta grupo kun senĉesa ridego.

Stankunas al la grupo: Mi tel ju, mi no hev ten sents, mi hev no fitti! kaj tuj al Izidoro: Kial vi ne parolas Esperante? It vil du ju gudd! Kaj Izidoro al Stankunas: Why don't you speak it?

Kaj Fraŭlino Segal, najbarino de ili, enmiksís: Pay now and stop it! kaj ambaŭ al F-ino Segal ekrespondis pure angle! Kaj Izidoro al Stankunas, kaj la tri parolis, angle, kaj ĉesis unue Stankunas. Kion mi devas pagi? demandis li.

Vi uzis dek frazajn pure angle, via monpuno estas unu dolaro, kaj se vi tion ne havas, oni pruntedonos ĝin al vi. Mi ne bezonas la

prunton, dek cendojn, naŭdek cendojn mi ne havis, sed jen la dolaro, dolarojn mi nur havas kun mi hodiaŭ!

Ridado senĉesa kaj amuziga!

Nun S-ro Izidoro vi uzis 15 frazojn pure anglajn, vi pagu \$1.50, kaj li donis \$1.50.

Alian vesperon enfalis nia samideano Charles Chomette, alinome nia Cali Caplin, kvankam li ne parolas bone angle, kaj ĉiam nur Esperante li deziris amuzigi nin per siaj ĉaplinaĵoj, kaj dum li efektive parolis Esperante, li forgesiĝis kaj enmiksitis 12 frazojn en siaj alparoladoj, ni silentis kaj montris al li la fakturon de \$1.20 por ŝuldata punmono, pagebla tuj!

Cu mi defakte uzis anglajn frazojn. demandis li.

Jes, sinjoro, jen ni stenografis ilin!

Bonvolu legi ilin!

Ho tute ne, sinjoro Caplin! Ĉar se mi legos ilin, mi estus punota! Sed mi tradukos ilin al vi Esperanten, diris nia stenografistino!

Tiam Caplin pagis unu dolaron kaj dudek cendojn!

La afero finis bonhumore, kaj la ĉeestantoj el aliaj urboj, precipe S-ino Monte-Gill el Montpelier, F-ino Bramson el Montreal kaj F-ino Meriam el Bostono, eĉ ne volis iri al siaj dormejoj, kaj resti kun ni ĝis la tagiĝo!

Sed, diris Fraŭlino Stoeppler, sciu ke F-ino Meriam apartenas al tiuj Bostonanoj, kiuj ne povas dormi dum la nokto!

Ho! ho! ho! ŝi estas noktbirdino! mi respondis. Nun mi scias, kial ŝi mokis sinjoron Samuelon Rozencvajgon el Pensylvanio, kiu ŝajnis esti la nedividebla kunulo de S-ro Keyes, dirante ke S-ro Keyes ne estus ebligita skribi sian poemon sen lia helpo, nek trovi ian straton el la urbego sen lia helpo, ke S-ro Keyes ne povis paroladi ĉe la granda banketo ĉar li ne sidis ĉe li, kaj tiel plu!

Sed kial vi miksas tiun mokadon? demandis F-ino Stoeppler.

Respondis mi: Virinoj, kiuj maldormas dum la nokto, serĉadas ion por kontentigi, kaj se tion ili ne trovas, ili elpensadas akrajn okazintaĵojn por kolerigi siajn edzojn, kaj se tian ili ne havas, la objekto devas esti alia persono!

D. A. Klajin.

Instruistino eksplikis frakciojn al lernantoj, kaj dezirante scii kion ili komprenis la eksplikon demandis de Bobjo—Nu, Bobjo, kion vi havus prefere, unu pomon aŭ du duonojn? Bobjo respondis tuj—Du duonojn. La instruistino estis iom malkontentigita, kaj diris—Kial vi preferus du duonojn? Bobjo diris—Ĉar tiam mi scius ĉu estas malbona interne. —el The Queenslander, trad. B. P. M.

—Bopomano

Agema vendisto de elektraĵoj elpendigis la anoncon: Ne mortigu la edzinon per malfacila laboro; uzadu nian maŝinon.

—Bopomano

Ni ludu Adamo kaj Evo'n—diris Fredjo, kiu estis manĝinta sian pomon.

Kiel ni tion faras?—demandis Milnjo.

Fredjo:—Vi min incitu manĝi vian pomon, kaj mi cedas.

REV. HORACE DUTTON

On August 4 Rev. Horace Dutton, of Auburndale, Mass., for many years an earnest advocate of Esperanto, died in Boston in his eighty-first year.

Mr. Dutton began life as a minister, but in 1879 gave up the pastorate and for some years was engaged in large business enterprises. For many years his time was wholly devoted to philanthropy and work for what he regarded as Christian causes. Thus for five or six years he was the unsalaried representative in Europe of the United Society of Christian Endeavor, pushing the work of young people's societies in Italy, Switzerland, Great Britain, Germany, Denmark, Sweden and Norway. In the latter country the movement he started has grown to large proportions.

Brought thus into contact with the language difficulty Mr. Dutton was led to make a study of Esperanto. He at once saw its importance and became a warm and eager advocate of it. He saw in it, however, more than a convenient means of international communication; he saw that much of the world's distress is caused by lack of understanding, and in Esperanto he recognized a means for bringing men and women of all nations into a closer fellowship of spirit and thus bringing about the brotherhood of man. Esperanto was in his view a handmaid of the Kingdom of God. He was not blind to its many advantages in commerce and other departments of the life of the world, but its supreme mission, in his thought, was that of preparing the way for understanding and peace.

Mr. Dutton worked for the Cause. He was a well-known figure among Esperantists abroad and attended more than one international Congress. In Geneva he discovered Mr. Edmond Privat and welcomed him later to the United States. In Boston for some years he was one of the most active members of the Esperanto Society.

Mr. Dutton was a true son of New England, an Anglo-Saxon in whom were blended traits of Puritan, statesman and mediæval saint. His faith in God was profound, his philanthropies were countless, and the native kindness of his heart led him at times to give away his very clothing to the poor.

He was a wide reader, deeply versed in theology, philosophy and history. His eager spirit could not be satisfied with local affairs; he needed the whole world to quench his thirst. During the war his faith never wavered. A true Esperantist, he had hope.

A few days before he died a message of greeting was brought to him from the Esperantist Congress in New York. It seemed to please him. But by that time he had laid his armor aside, his battles over. He went out greeting death, as Browning says, with a cheer. Those that knew him will remember him long as one of God's gentlemen,

Robert P. Anderson.

Boston, Mass.

OFFICE NOTES

Sendante al ni internaciajn respondkuponojn, certigu al vi ke ili estas laŭleĝe poŝtstampitaj—alie ili tute ne valoras al ni, kaj vi ne ricevos la menditaĵon.—(Tiu ĉi avizo estas nur por niaj fremdlandaj klientoj).

In sending Canadian money, please allow for the difference in exchange. At present we can get only 87 cents for a Canadian dollar bill. Canadian postage stamps cannot be used in the United States.

Increased membership means increased strength in the Association; a larger subscription list to Amerika Esperantisto makes the overhead charges correspondingly less, a better and larger Magazine with no increase in the subscription price.

Additional copies of the Congress number in packages of 10 or more at 5 cents each.

News from local societies or groups should reach the office by the tenth of the month at the latest.

The Guarantee Fund has now reached One Thousand Dollars, and a call for 25% of same will be sent out within the next ten days.

Additions to the Guarantee Fund are much needed to carry on propaganda work.

LA SEKRETARIECO

Unu funkcio de la sekretarieco de nia asocio devus esti la feliĉigado de la membroj kaj la petantoj (ĉu membroj aŭ ne). Laŭe, en mia nova ofico, kiam lastatempe mi ricevis demandon de persono el Worcester, senprokraste mi poŝtkarte respondis, kun la avizo atendi plenan respondon de la helpsekretario post malmultaj tagoj. Malgranda afero, sed sufiĉa por montri mian bondeziron.

Alia funkcio, speciale interesa al mi, estas havigi al ĉiu samideano la privilegion iumaniere helpi al nia movado. Por sugestioj tuicelen, mi petas ĝeneralan respondon, por ke ni havu longan liston de "farotindaĵoj." Por komenci la liston, mi volus nomi:

1. Statistiko de la vera progreso de Esperanto, ĉiudetale, tra la mondo. (Entrepreno en kiu oni povus alporciigi multajn diversajn laborerojn, ĉu ne? Eble plejparte funkcio de la propaganda komitato.)
2. Helplibro, aŭ flugfoliaro, por grupkondukado; riĉa en ekzemploj de diversaj metodoj por tenadi la intereson de la grupmembroj.
3. Pliĉonigo de la vortaro por ke estu troveblaj kiel eble plej multe da esprimiloj, por kiuj la spertularo kompreneble sopiras. (Vidu mian artikolon, ĉi-numere, titolitan "La Cerbumulejo.")
4. La revenigo de antaŭaj samideanoj. (Taktbezona afero, por kiu eble longa studado estus necesa. Kiel, ekzemple, ni reentuziasmigis la pasintjarajn viglulojn el la nomoj Fessenden, Hall, Parrish, Reed, Stanyan, Twombly, k.t.p.? Mi supozas ke ili ne nun legas "Amerika Esperantisto," kaj ke senhezite ni povus diskuti la strategion en tiu ĉi gazeto, kvankam la senpera komunikado, la "sonorigilhavo de la kato," estus alia afero.)

5. La partopreneco de kongresanoj kaj de kongresemluloj en kongresaferoj. (Nuntempe, tiuj aferoj estas tromulte enpartoprenataj nur de eminentuloj kaj eminentulaĉoj. Tial, mi volus rekomendi ke la aga komitato invitu la samideanaron sendi al la sekretario, aŭ plibone, al Amerika Esperantisto, antaŭkomunikajojn nun por la 1921-a kongreso, kiujn la estrado povus redaktii kiam ne tute trafaj, kiel ricevataj, por legiĝi ĉe la kunsidoj.) Sufiĉo da sugestio! ĉar eble la vera funkcio de la sekretario devus esti nur ke li plenumu, per taŭga respondo, la petojn de ĉiuj kaj elsendi la oficialajn komunikajojn kiel ordonita de la estrado.

G. W. Lee, Sek. E. A. N. A.

LA CERBUMULEJO

Alskribu! ĉiuj interesatoj! sendante viajn Esperantiĝojn por la jenaj:

Esperantigotaj **Laŭsence angleesprime** **"Aĉulo" proponas**

1. Injury—Such practice is an **injury** to our good name difektigo
2. Master—He has **mastered** the language atingis la altan gradon
3. Excel—He has reached the top notch
4. Appreciate—He **appreciates** Esperanto as worth studying valoras
5. Do without—He cannot **do without** an automobile funkcii sen
6. Discourage—The rain **discouraged** our walking malkuraĝigis
7. Convenient—Would it be **convenient** for you if I should
come for supper tonight? konvenus
8. Conventional—He always goes the **conventional** way laŭmora
9. Unconventional—Dr. Zamenhof was not afraid to go
the **unconventional** way kontraŭmora

10. Vocabulary—He has a good **vocabulary** in speaking vorthaveblo
Mi esperas ke la legantoj multnombre skribos al la redakcio de Amerika Esperantisto, ne nur koncerne la suprecititaj vortoj sed ĉiujn vortojn kiuj interesas ilin, ĉu demandi aŭ proponi. Komprenoble, por ŝatinda respondo, la redakcio multokaze bezonos la opiniojn de pli ol unu lerta, sperta kaj klera samideano. Pro tio, ne ĉiam en la sama numero de la gazeto povos esti presita la respondo kun la demando.

G. W. Lee,

("Memelektita komitato de unu," laŭ anonco de Prez. Payson.)

New York Notes


July 29th Mr. Morton gave a lecture about Esperanto before the Pamphilian Club, and the Harmonio Chorus sang songs in Esperanto, with the result that the Pamphillians decided to take up the study and use the language in their particular work.

The next Barĉo of the Harmonio will be Friday, September 10 at the Little Roumanian Casino, 120 2nd Ave. Please notify Harmonio, 1 West 34th St. if you will attend and the number of guests. Classes, chóruses and lectures reopened with the cool weather.

New York Barĉo resumed Friday, Sept. 17 at Hotel Endicott, Columbus Ave. and 81st St.

GAZETARO ESPERANTISTA

- British Esperantist—July-August.
 Esperanto, Itala Revuo—Milan, Julio-Aŭgusto.
 Esperantista Laboristo—Paris, Aŭgusto-Septembro.
 Esperanto Praktiko—Berlin, Julio.
 Esperanto Triumfonta—Budapest, Julio.
 Franca Esperantisto—Paris, Julio.
 Germana Esperantisto—Dresden, Julio.
 Hungara Esperantisto—Szged, Majo-Junio.
 Internacia Komerca Revuo—Zurich, Majo-Junio.
 Internacia Lingvo Esperantida—Juni-Julio.
 Kristana Espero—(Finland), No. 2.
 Laboro—Monata Organo de Portugala Laborista Esperanto Federa-
 cio, Lisbon, Junio.
 La Espero—Huddinge, Svedujo, Majo-Junio.
 La Progreso—Ĉeĥoslovaka Organo Esperantista, Plzen, Junio.
 La Unuigita Tuthomaro,—Hamburg, Julio-Aŭgusto.
 La Revuo Orienta—Tokio, Junio.
 Esperanto-Mittellungen—Graz, Julio.
 Nederlanda Katoliko—kun Esperanta Angulo, Julio-Aŭgusto.
 Verda Utopia—Osaka, Japanujo, No. 1, Julio.
 Bohema Esperanto-Servo—Adresaro de l' Esperantistoj en ĉiuj lan-
 doj, Maravany.



LA VERDA STEL'

Plenigu la glason, ho ĉiu bonul'
 Vivu la verda stel'
 Kaj kantu la homoj el ĉiu angul'
 Vivu la verda stel'!
 Vivu la, vivu la, vivu la stel'
 Vivu la stel'
 Vivu la verda stel'.
 Plenigu la glason kaj tostu kun ni
 Vivu la verda stel'!
 La Majstron, ĉar vera bonul' estis
 li.
 Vivu la verda stel'.
 Per voĉoj de nia kunbatalantar'
 Vivu la verda stel'!
 Resonu la vok' tra la ter' kaj la
 mar'
 Vivu la verda stel'.

EKSKURSANTO

Kun cent mil voĉoj voku ni,
 Hura, hura, hura,
 L'aeron freŝan ĝoju ni,
 Hura, hura, hura,
 Kaj iru el la ĉambro for,
 Ekskursu kien ŝatas kor',
 Ekskursu, ekskursu, ekskursu kun
 hura,
 Hura, hura, hurale, rale, ra,
 Hura, hura, hurale, rale, ra,
 Ekskursu, ekskursu, ekskursu kun
 hura.
 Ja ĝuas en sunbril' la mond'
 Hura, hura, hura,
 Odoras dolĉe val' kaj mont'
 Hura, hura, hura,
 Birdeta vekas kantsonor'
 Kaj igas, kanti ni en kor',
 Ni kantu, ni kantu, ni kantu kun
 hura!
 Hura, hura, hurale, rale, ra,
 Hura, hura, hurale, rale, ra.

LA SVANRIVERO

Ho mi sopiras pro la hejmo,
 Pro la parenkar'
 Kaj pro la kara Svanrivero
 Kaj pro l' junecamikar'
 Mi vivas nun sur fremda tero
 En malproksim'
 Pro l' hejmplantejo sen espero
 Sopiras mia anim'
 Ĉie regas malgajeco
 Dum mi vagas for
 Ho negroj ĉiam sopiradas
 Pro l' hejma land', mia kor'.


ESPERANTO

Mi staras sub la lun'
 En blua maro
 Kaj sole pensas nun
 Bone pri l' homaro.
 Ja min komprenas nur
 Homameganto
 Kaj Esperanto!
 Ekvenu nova hor'
 Anoncu l' amon
 Forigu el la kor'
 Bestan la malamon.
 Ĉin amo benos ja
 Homameganto
 Kaj Esperanto!

La subtavolo de tiu pasteto estis abomene malmola,—diris la sinjoro al la kelnero.

Pardonu, sinjoro,—diris la kelnero—la pasteto havis nenian subtavolon, ĝi estis kuirita en papera telero, kaj vi estas manginta la teleron.

“LA PHONILO”



An Esperanto Word

An Esperantist's
 Invention



The **PHONILO** is a simple pocket device that plays all needle records. It is not a toy but will last a lifetime. Can be carried in the pocket as conveniently as the pipe or watch. It is the only phonograph without machinery. It is the only phonograph wherein the record does not revolve. It is the only phonograph without a reproducer. It is the phonograph **without** a soul. Tial metu en ĝi la animon mem.

Postpaid, \$1.00

Foreign Countries, \$5.00

Half of price returned if you write your order in Esperanto.

HAND-PHONILO CO., 123 West Madison St., Chicago.